

La arto perdadi

La homa lingvo kreis multe da vortoj por niaj virtoj kaj malvirtoj, por multnombraj niaj talentoj kaj por pli multaj nekapablecoj kaj malfortoj. Ni havas: sindetenemon, ŝparemon, arogantecon, malmoderecon, distriĝemon, hezitecon, fidindecon, silentemon kaj dekojn da pluaj, sed ne ekzistas nomo por la agoj de tiu, kiu sonĉese ion perdadas. Kvazaŭ la spirito de la lingvo mem ekhezitus, kien envicigi tiajn ĉi faradojn, aŭ kiel ĝi atendus, kien ĝi mem envicigos per sia forto kaj per sia karaktero. Multaj dirus, ke temas pri malvirto aŭ malforto, sed mi asertas, ke la daŭra kaj laŭsistema perdado apartenas inter la belajn artojn kaj atingas ĝis la sfero de magio.

Mi mem perdadas dum la tuta mia vivo grandajn aŭ malgrandetajn aĵojn, kaj ĉar mi malrezistis, tiel kiel plimulto da homoj, al la eraro, ke estas decidiga, la prezo de tiu aŭ alia aĵo kaj ke la homa farado estas kalkulebla nur en mono, mi turmentiĝis per tio. Nun mi jam scias, ke temas pri la talento kaj ke la materia flanko de ĉiuj miaj perdoj estas bagatela kompare kun la valoro de tiu ĉi donaco, de tiu ĉi kapableco kaj forto.

Ĉiu certe ion iam perdos: krajonon, kombilon, poŝtukon aŭ monujon, sed tio estas hazarda, kiu ne rezultas el liaj denaskaj kvalitoj kaj kiu malhavas la intendanton kaj ĉarmon de vera perdado. Tia homo miras, ke li ion perdis, li nekapablas tion kompreni, li skuas la kapon aŭ plektas la manojn, ĉar la pordo ne estas el lia mondo, ĝi estas por li faro same fremda kaj timiga, kvazaŭ li subite pro nenio skribus poemon, aŭ ekrigardus la estontecon. Lia perdo estas klarigebla per iu lia malforteco, ĝi estas vere kaj sole la sekvo de malzorgeco aŭ de distreco kaj eblas facile ĝin retroprocedi klarigi. Ĝi estas la ago sen patoso kaj inspiro, do nearta kaj ordinara. Sed tio ĉi, kio mi nomas la vera perdado okazas ĉiam en la momento sanktigita kaj krea, la homa malforteco ĉi tie estas negrava kaj per neniu racia klopodo oni povas ion kompreni, nek klarigi.

La distriĝeco post mallonga tempo ekmemoros, kie li estis, kion li faris, tra kie li promenis kaj kiam kaj kie li havis la perditan aĵon lastfoje ĉe si. Li povas trovi ĝin.

Nenio simila eblas ĉe la perdo vera kaj grandega. Ni rememoros pri ĉio, sed la momento de la perdo mem estas jam mergita ne en mallumon, sed en troan lumegon kaj en blindigan lumon de la krea kapturniĝo.

Mi konas virinon, kiu iun matenon eliris el sia hejmo, vizitis kelkajn vendejojn, parolis sur la strato kun kelkaj konatoj kaj revenis tagmeze hejmen. Tie ŝi konstatis, ke ŝi perdis parton de sia tolaĵo, kaj nome el la supra duono de la korpo. En vendejoj, eĉ sur la strato ŝi ne senvestiĝis. Ĝis hodiaŭ ŝi ne scias kiel tio okazis, kaj ŝi ne klopodas tion ekkompreni. Nur la homo, obsedita de fierego volus en tiu ĉi okazo kompreni kaj scii.

La aĵo perdita en nura banala distreco restas sur la loko, kie ĝi estis forgesita, trovata de ĝia posedanto, aŭ trovanto kaj tiuj ambaŭ baldaŭ konstatos, ke tio estas la aĵo, kiu estas, estis kaj estos. Malzorgemulo perdos blankan poŝtukon kaj iu iranto post li trovos blankan poŝtukon.

La poŝtuko restos en tiu ĉi mondo kaj estos ĉiam la sama laŭ la formo, koloro kaj taskoj. Sed la aĵoj perditaj, kiel mi diras, en la krea momento, malaperas senrevne al atingo de homoj. Mi ne scias, kio kun ili okazas kaj okazos kaj neniu tion scias. Ili eble ŝanĝiĝas je floroj, aŭ steloj kaj eble ankaŭ je malgrandaj fuĝemaj lumetoj, aŭ je malgrandetaj arom-alblovoj. Estus freneze kaj vane serĉi ilin.

Ĉi tien apartenas ankaŭ la rakontado pri la virino, kiu perdis melonon. Iun tagon veturis tiu ĉi virino per aŭtomobilo kaj perdis melonon. Ŝi sidis post la ŝoforo kaj la melono kuŝis apud ŝi. Ŝi ŝatis melonojn kaj ĝojis nur, kiel ŝi ĝin distranĉos kaj manĝos. Estis jam nokto. Estis profunda lunluma nokto kaj per tio oni klarigas multon, almenaŭ al tiuj, kiu ne volas havi ĉion klarigita. Subite, nome, la virino ekvidis, kiel la pordeto de la aŭtomobilo malfermiĝis kaj kiel la melono iras eksteren. Eble ĝi estis somnambula melono, sed eble ankaŭ ĝi havis siajn proprajn motivojn. En la melonon neniu vidas. Ĝi estis for kaj la pordeto denove fermiĝis. Estas necese aprezi la saĝecon de la virino, kiu faris nenion, por ke ŝi malebligu tion, kiu ne moviĝis, ne ekkriis kaj kiu tion simple rigardis kun tiu sento de mirego kaj de humileco, kun kiu ni rigardas la maran alfluron aŭ la falon de steloj.

Estas perdoj – mi parolas nun nature pri perdoj veraj – kiuj prepariĝas longan tempon. Dum tiu ĉi tuta tempo estas en ni maltrankvilo kaj timo. Ni estas kondamnitaj, la aĵo kaj ankaŭ ni estas decile pri nia disiĝo, sed niaj kernoj, la koro de la aĵo kaj ankaŭ nia koro kvazaŭ ankoraŭ ne kredus, kvazaŭ ankoraŭ esperus.

Vane.

Estas ankaŭ perdoj, mi diras sekundaj. Iu fulmo ekflamos sur la pura firmamento de niaj faroj, blindigos niajn okulojn kaj ni, meze de la ĉiutaga kaj konata aktiveco, formetos ion ien kaj jam ni ne scias, jam ni denove rigardas al ĉiela bluo, kvazaŭ nenio okazis, kvazaŭ nenio nin forlasus, subite, por ĉiam kaj sen reveno.

Per tio ĉio mi ne volas diri, ke pri ni kaj pri niaj aĵoj estas decidate ekster ni. Estas profundaj klopodoj en ni kaj en ili, kaŝitaj deziroj kaj forgesitaj rilatoj, multe da streĉo kaj neesprimeblaj sopiroj, nekofesitaj koleregoj kaj nesekretigeblaj simpatioj – ie kaj tie.

Mi ricevas aŭ netas iam iun aĵon kaj de la unua momento ni scias: vin, aĵo, mi perdos. Vi ne estas mia.

Aŭ: vin, homo, mi forlasos, vi ne plaĉas al mi. Vi ne estas mia.

Kaj male estas aĵoj, kiuj adheras al ni kaj de kiuj ni ne povas senigi nin. Ili revenas ree kaj ree kaj eble ankaŭ kontraŭ nia volo, ili reveas tiel longe, ĝis ili mildigos nian malplaĉon kaj ekplaĉos al ni.

Vagante unu tagon tra arbaro, mi trovis naĝkalsonon. Mi ekĝojis, ĉar ĉiujare mi naĝkalconon perdas, sed neniam mi iun trovis. Mi levis ĝin kaj konstatis, ke tio estas mia naĝkalsono, kiun mmi antaŭ unu horo perdis kaj dume tion ne eksciis. La sekvan tagon mi forgesis ĝin apud la rivero kaj trovis ĝin post tri horoj sur la salo de iu biciklisto, kiu kompleze redonis ĝin al mi. Unu tagon pli poste ĝi restas sur da benketo provinca stacidomo. Ĉi tie ĝi estis trovita kaj kaŝita, ĝis mi venis por ĝi. Reveturante kun ĝi Pragon, mi forgesis ĝin en la vagonaro. Mi ricevis ĝin denove kaj de tiu tempo mi tre ŝatas ĝin. Ĝia silenta kaj pasia fideleco kortuŝis min. Iun tagon, eble, uragano forprenos ĝin de mi, aŭ la cervo forportos ĝin sur la kornaĵ, sed mi ne perdos ĝin. Mi estas pri tio certa.

Oni ne povas esti kun aĵoj kaj resti indiferenta al iliaj malgrandaj vivoj. La homo, kiu ne scias pri neregula melankolio de sia poŝtranĉilo, kiu facilanime malatentas la noktan angoron de sia horloĝeto kaj ne zorgas pri malgrandaj amuzetoj de siaj okulvitroj, povas de siaj aĵoj kaj de la vivo atendi nur malmulte. Li ne kapablas kompreni siajn aĵojn.

Li kapablas ilin nek havi, nek perdi.

Ing. Jan Werner: Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana. 184 pĝ. Eldono de la aŭtoro. Brno 1990. Kčs 39,--.

Eble vi opinias, ke la matematika vortaro ne koncernas vin. Vi ja estas simpla homo, via malgranda esperanta vortaro por vi sufiĉas, kia do elspezi monon por faka verko, kiun vi ne bezonas? Sed vi ege eraras! Ankaŭ en faka verko ni povas trovi interesajn kaj utilajn vortojn, utiligeblajn en la normala esperantista vivo, en la konversaciado kaj korespondano. Ĉu vi ne kredas?

Vi eble scias, ke ĉtverec estas kvadrato, obdélník oblongo kaj trojúhelník trinangulo. Sed ĉu vi scias, kie diri esperantlingve trojúhelník pravouhly, rovnoramenný, rovnostranný? Do: triangulo orta, simetria, egallatera. Kaj ĉu vi scias, kiel diri en Esperanto čára tečkovaná, čárková, čerchovaná? Linio punktita, streketita, strekopunktita. Kaj kiel diri nárys, bokorys, půdorys? Fronta projekciaĵo, flanka projekciaĵo, horizontala projekciaĵo.

Certe vi konas la vortojn miliono, miliardo, biliono, triliono ktp. Sed ĉu vi scias, ke en diversaj landoj ili havas diversan signifon? Ekz. en Sovet-Unio, Usono, Francio biliono egalas nian miliardon, triliono nian bilionon, kvintiliono nian trilionon ktp. Esperanto solvas la problemon per partaj sufiksoj; -iliono esprimas eblojn de miliono: duiliono 10^{12} – bilion, triiliono, 10^{18} – trilion, kvariliono 10^{24} – kvadrilion, kviniliono 10^{30} – kvntilion; - lliado estas miloj de -ilionoj: duiliardo 10^{15} , triiliardo 10^{21} , kvariliardo 10^{27} . La sufikso -aria havas la saman signifon kiel -uma: duaria, duuma – dvojkový, dyadický, dekaria, dekuma – desítkový, dekadický.

En la vortaro vi povas trovi multajn terminojn, kiuj povus esti uzablaj kiel vortoj de la ĉiutaga bezono, ekz. libovolný – arbitra, náhodný - aleatora, ohraničený – barita, uzavřený – kloza, otevřený – aperta, dolní – infra, kompatibilní – interakorda ktp. Necesas nur foliumi la interesan libron, serĉi inter la 3722 terminoj aŭ konsulti la laŭalfabetan ĉeĥan (kaj ankaŭ germanan) registron. Cetere sufiĉas kompari la ĉeĥan registron kun laŭalfabeta registro en kiu ajn matematika lernolibro kaj vi konstatos la amplekson kaj riĉecon de la nova esperanta terminaro.

Ĝi estas jam longe atendata verko, kiu levos la prestiĝon de Esperanto ne nur en fakaj medioj. Ĉiu koscia esperantisto devus posedi ĝin. Sed ĝi estas ankaŭ bonega donaco por neesperantistoj, ekz. studentoj de matematiko aŭ de la germana lingvo. Ĉu via filo aŭ nepo ne bezonos ĝin?

Ĝojige estas, ke la verkon kontrolis ankaŭ membro de nia klubo d-ro Jan Hejzman.

Mi esperas, ke la matematika vortaro kontribuos al unuecigo de la esperanta terminologio. Kiam mi komencis lerni Esperanton antaŭ pli ol kvardek jaroj, mi lernis multobligi jene: duoble ses estas dek du. Kaj dividi jene: dek du dividite per du estas ses, aŭ mallonge: dek du per du estas ses. Ĉar frakcio estas ankaŭ divido, oni povas diri: $\frac{3}{4}$ tri per kvar. Tion ĉi mi instruis ankaŭ al miaj lernantoj en kursoj, kiujn mi poste gvidis.

Nun multe pli malfrue mi trovis, ke mi eraris kaj ankaŭ erarigis miajn lernantojn. Laŭ PAG (Plena analiza gramatiko de Esperanto) oni multiplikas: „duoble ses faras dek du“ aŭ: „du per ses estas dek du“ kaj analoge oni diras: formato 14 x 20 cm „formato de dek kvar per dudek centimetroj“ kaj dividas: „sesdek unu dividite per kvar faras dek kvin, restas unu; duone kvar estas du“.

Do laŭ PAG „du per ses estas dek du“, dum mi longe opiniis, ke „du per ses estas nul komo tri tri tri...“. Estas do evidente, ke la mallonga formo „per“ estas dusenca kaj evitinda; preferindaj estas la klaraj, kvankam longaj formoj: dividite per, multobligite per. Sed ĉar la praktika uzado postulas mallongajn kaj koncizajn formojn, estas tasko de la esperantistaj matematikaj fakuloj difini tiajn. Kaj kun aparta kontento mmi konstatis, ke en la Matematika vortaro de Jan Werner troviĝas „termino“ p e r kun ekzemplo: N/m^2 = nutno per kvadratmetro. Ŝajnas al mi, ke tamen iam mi ne eraris...

Jiří Patera

La 28-an de septembro 1991 edziĝis membro de nia klubo kaj prezidanto de ĈEA s-ano D-ro Ing. Petr Chrdle, CSc. Al li kaj al lia edzino Stanislava ni deziras konstantan prosperon en ilia komuna vivo.

Z dopisu paní Soni Zedníkové:

... chtěla bych vás upozornit na vysílání televize o esperantu na programu I v neděli dne 22.9.91 ve 12-13 h (v poledne) v pořadu Naše hobby, Vaše hobby. Byla tam doslova představena Letní škola esperanta v Popradě, pak o ní a vůbec o esperantu promluvil Ing. Milan Zvara, předseda Slovenského esp. svazu, a dále byla interview s některými posluchači školy a esperantisty v esperantu, mezi nimi též jednoho cizince, což bylo ihned překládáno do slovenštiny. Škoda, že podobný pořad nebo nebyl (nebude?) také o letní škole v Lančově a o Českém esp. svazu v Praze apod. Prožote však tento program o esperantu a slovenských esperantistech byl vysílán na celostátním okruhu FI, myslím že i nás se týká, a že byste měl poreferovat nebo se alespoň zmínit v „Bultenu“ či ve „Startu“ o tom (snad v čes. jazyce, aby i začátečníci rozuměli). Napsala jsem hned po odvysílání tohoto programu též na Čsl. Televizi, kde jsem poděkovala za informaci o esperantu v televizi a zároveň jsem redaktory upozornila, že esperanto není pouhým zájmovým koníčkem, nýbrž chce být i něčím více jako spojovatelem všech lidí světa v jednom jazyku a tudíž i sbratření lidí přes hranice bez jazykových bariér, zároveň vážným přispěvatelem k celosvětovému míru v dnešním tak národnostně a etnicky rozkolísaném světě. Zároveň jsem je požádala o znovuuvedení kurzu esperanta ve slovenštině, který televize vysílala v 60tých letech pro slovenské diváky. Nyní, po vyjmutí z archivu, bylo by možno uplatnit ho na celém federálním vysílači pro mnohé diváky nejen ze Slovenska, ale i pro zájemce z Čech. Pokud jste tento pořad sledoval, měl byste také napsat televizi a požádat je o znovuuvedení kurzu esperanta a připojit se tak ke mně a k p. Maříkovi (též psal) a příp. i jiným. Je mi jenom s podivem (a vlastně líto), že Slováci i za těchto těžkých podmínek v našem státě dokáží prosadit tuto relaci do televize, zatím co my Češi mlčíme...

KLUBAJ PROGRAMOJ

4.11. Ekspedo de la nova Bulteno. Komuna kantado	- ĉiuj
11.11. La angla – internacia lingvo	- Howard
18.11. Letero de Kei Kurisu	- Zedníková
25.11. 76-a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno	- Chrdle
2.12. Lingva angulo	- Mařík
9.12. Heraldikaj legendoj	- Patera
16.12. Zamenhof-vespero	
23.12. Kristnaska vespero	- ĉiuj
30.12. Silvestra vespero	- ĉiuj
6.1. Ekspedo de la nova Bulteno. Komuna kantado	- ĉiuj

La kunvenoj de nia klubo okazas ĉiulunde de la 17.30 horo en la klubejo Vejvodova 1, Praha 1. Venu!

GAJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN JARON 92'AL ĈIUJ BONAJ HOMOJ!

Bulteno de Klubo de Esperantisto jen Praha, p. k. 1069, 111 21 Praha 1.
Redaktas la komitato de la klubo.

Vážení přátelé,

blíží se konec roku a s ním i placení členských příspěvků na rok příští. Přes tíživou ekonomickou situaci se na r. 1992 členské příspěvky nezvyšují.

Víme, že finanční situace nás všech je tíživá. Musíme však vytrvat, jsme přeci esperantisté, espero – naděje. Naděje na lepší příští.

Prosíme, abyste členské příspěvky uhradili neprodleně a to nejdéle osobně při klubové schůzce (každé pondělí od 17,30h – Vejvodova 1). Tento způsob platby preferujeme proto, že banka si počítá za každý převod 2,20 Kčs, což při celkovém počtu členů ubere dost peněz z naší společné kasy.

Pokud nemůžete přijít osobně, zašlete peníze přiloženou poštovní poukázkou a přidejte dle vlastní úvahy obnos na bankovní poplatek. Zvláště nám pak dopisem platby specifikujte – např. 80,-- Kčs příspěvky svaz, 50,-- Kčs přísp. klub, 10,-- Kčs dar svazu, 10,-- Kčs dar klubu, 3,-- Kčs bankovní poplatek. Moc se omlouvám za složitost, ale jinak prostě nepoznáme, kolik a na co nám posíláte, protože nedostaneme z banky útržek poukázky se sdělením pro příjemce. Děkujeme za pochopení.

Přehled ročních sazeb členských příspěvků:

Příspěvky svazové:

Kategorie A – výdělečně činní	80,-- Kčs
B – důchodci, studující, nezaměstnaní, ženy v domácnosti, vojáci zákl. služby, invalidé	40,-- Kčs
C – podporující esperanto	200,-- Kčs
D – rodinní příslušníci	20,-- Kčs
E – příznivci esperanta	20,-- Kčs
F – doživotní členství	1600,-- Kčs jednou pro vždy

Příspěvky klubové:

Kategorie I. výdělečně činní	50,-- Kčs
II. důchodci do 70 let a ostatní jako svaz – kat. B	30,-- Kčs
III. důchodci nad 70 let	10,-- Kčs

Jako každý rok opakujeme, že členové klubu platí i svazové příspěvky přes klub. Pokud klub tyto svazu hromadně předá do konce t. r., nechává si 10% z této částky pro svoji potřebu. Proto je nutné, abyste příspěvky zaplatili co nejdříve – naše klubová pokladní potřebuje čas na zpracování (a před Vánoci bude péct cukroví – přijďte na vánoční večírek ochutnat, peče moc dobře).

P O Z O R III MIMOŘÁDNÁ NABÍDKA!!!

Česko-esperantský slovník bratří Filipů za bezkonkurenční cenu 65,-- Kč – ano, čtete dobře, za tuto sumu obdržíte I. i II. Díl tohoto známého slovníku – skutečně 2 knihy dohromady za šest desetikorun a jednu pětikorunu.

Cena je konečná, tedy včetně expedičních nákladů.

Společně s knihami obdržíte i SLOSOVATELNÝ KUPÓN.

Tři vylosovaní výherci se zdarma zúčastní víkendové akce v Praze – oslav 90. výročí založení našeho klubu – koncem r. 1992.

Počet slovníků a tedy i účastníků losování je omezený – neváhejte a objednejte ihned na adrese: Klub esperantistů, p. sch. 1069, 111 21 Praha 1.

Hubnová